Heinrich Heine,

# En nord' unu pino en solo

*tradukita de Ludwig Lazarus Zamenhof*

*Iomete ŝanĝita versio*

En nord' unu pino en solo
Dormetas sur nuda altaĵ;'
Glacio kaj neĝa tavolo
Ĝin kovras per tomba tolaĵ'.

Ĝi sonĝas, ke palmo gracia
Ĝi estas en orient',
Eterne pri lando alia
Sopiras ĝi en silent'.

*Traduko de la Germana poemo "Ein Fichtenbaum steht einsam" de* HEINRICH HEINE *(∗1797-12-13 – †1856-02-17) en Esperanton de* LUDWIG LAZARUS ZAMENHOF *(Ludoviko Lazaro Zamenhofo, ∗1859-12-15 – †1917-04-14).*

*Arg-1023-2074 (2014-05-23 14:39:50)*

*Mi, Manfred Retzlaff, aliigis en 2014-05-23 la Zamenhofan tradukon tiel, ke la rim-skemo estas la sama kiel en la germana originalo.*

Heinrich Heine,

# Ein Fichtenbaum steht einsam

Ein Fichtenbaum steht einsam
Im Norden auf kahler Höh';
Ihn schläfert; mit weißer Decke
Umhüllen ihn Eis und Schnee.

Er träumt von einer Palme,
Die fern im Morgenland
Einsam und schweigend trauert
Auf brennender Felsenwand.

*Verkinto de tiu ĉi Germana poemo estas* HEINRICH HEINE *(∗1797-12-13 – †1856-02-17).*

*Arg-1023-2072 (2014-05-23 14:24:32)*

*La poemo troviĝas interalie en* `http://www.heinrich-heine.net/haupt.htm`.